Novjorka Prismo

Numero 123 Aprilo 2003

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia aprila kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 25-an de aprila 2003, 6:30-9:00 ptm <<< NOTU: LA KVARAN VENDREDON DE TIU ĈI MONATO

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Brian Singer prezentos Surprizan Prelegon
– Nijl Blonstein gvidos diskuton pri la milito en Irako (vidu artikolon sur paĝo 2). ★

## Protokolo de la kunveno de la 21-a de marto 2003

Ĉar Tomaso ECCARDT prezentis la prelegon, Tomaso LEONG faris la laboron de la prezidanto dum tiu ĉi kunveno.

Antaŭ la komenco de la kunveno, nia kasistino, Sofiya SOSKINA distribuis kopiojn de la aliĝilo por la ELNA Jarkongreso de 2003.

Oni demandis ĉu ni okazigos nian venontan kunvenon je la 18-a de aprilo. La problemo estas, ke tiu tago okazos je la kristana festotago "Bona Vendredo". Oni supozas, ke la konstruaĵo eble estos fermata je tiu tago. La konstruaĵo eble ne estos malfermata pro alia kialo: la UFT eble translokiĝos antaŭ tiam. Intertempe, ni devas supozi, ke ni okazigos la kunvenon je la kutima tempo, ĉe la kutima loko. Tiu tago estas ankaŭ la dua tago de la hebrea Pasko.

Je 7:08 ptm, Tomaso L. oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 10 personoj, inter ili unu gasto: Eliana DANTES el Natal, Brazilo. Ŝi estas amikino de Nijl BLONSTEIN. Personoj, kiuj ĉeestis la Universalan Kongreson en Fortaleza, Brazilo, jam konatiĝis kun ŝi. Dank' al la UK, Eliana revenis al la Esperanto-movado post multaj jaroj, dum kiuj ŝi ne uzis la lingvon.

Tomaso L. demandis, ĉu iu ajn havas korektaĵojn por la pasintmonataj *Novjorka Prismo* kaj protokolo. Kompreneble, Rochelle F. GROSSMAN havis kelkajn: estu CONTI (anstataŭ CONTE); estu CANSECO (anstataŭ CONSECO); estu vicpatrino aŭ duonpatrino (anstataŭ stifpatrino). [Sed la vorto "stifa" aperas en la vortaro de Butler, kun la signifo "rilata per dua edziĝo".] Tuj poste, Tomaso L. demandis ĉu la protokolo estas akceptata, kaj ĝi estis akceptata.

Tomaso L. kuraĝigis nian gaston paroli pri si mem. Eliana diris, ke ŝi ne parolas la anglan, kaj ni estas la unuaj personoj, krom Nijl, kun kiuj ŝi povis ĝui konversaciojn, ekde ŝi eniris Usonon. Eliana estas instruistino en speciala lernejo por infanoj, kiuj havas emociajn aŭ lernajn problemojn.

Tomaso L. kuraĝigis personojn ĉeesti la Jarkongreson de ELNA.

Nijl menciis, ke dank' al Eliana, li povis legi kaj kompreni reagoleterojn, kiuj aperis en la sama brazila ĵurnalo, en kiu la intervjuoj de li aperis pasintjare.

Sofiya anoncis, ke 41 personoj jam pagis la kotizon por esti membroj de nia klubo por la jaro 2003.

Je 7:21 ptm, Tomaso L. prezentis Tomason E., kiu komencis sian prelegon. Antaŭ la prelego, multaj ĉeestantoj ne sciis la signifon de la vorto "semiotiko." Tomaso E. donis al la ĉeestantoj fotokopiojn de paĝo de notoj, por faciligi la komprenon de la prelego.

Semiotiko simple estas la studo de simboloj, aŭ pli precize, signoj. Simbolo enhavas la signifon de objekto. Vorto povas esti simbolo, sed ankaŭ krucosigno, butono, verda stelo, ruĝa lumo, kaj eĉ milito povas esti simboloj. Fulmo signifas, ke tondro venos. Fulmo do estas simbolo. Malpuraj ŝuoj povas esti simbolo, indikante senhejmeco. La signo kun cigaredo en cirklo kun streko trans la cirklo povas signifi "Bonvolu ne fumi!" aŭ "Fumado malpermesata!" aŭ "Puno por iu ajn, kiu fumas ĉi-tie!" Eĉ la dancado de abeloj estas simbola sistemo de komunikado.

Dum la prelego, Tomaso E. menciis la nomojn de kelkaj semiotikistoj, kiuj kontribuis al la disvolviĝo de semiotiko, de kio lingvistiko nun estas branĉo, kaj la modelojn uzatajn de tiuj semiotikistoj. Tomaso E. ankaŭ montris la rilatojn inter simboloj, objektoj, kaj la komunikantoj, kiuj sendas kaj ricevas mesaĝojn.

La prelego finiĝis je 8:42 ptm. Tuj poste, Tomaso L. oficiale fermis la kunvenon. Post la kunveno, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio-manĝaĵvendejo Emma's Dilemma por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Esperanta recitalo


Ĝratulon kaj dankon al Tomaso Morgan pro la superklasa recitalo (senior recital), kiun li okazigis la 30-an de marto ĉe Manhattan School of Music. Li ludis bason dum liaj samklasanoj ludis saksofonojn kaj pianon por la unuaj kvar pecoj. Post tiuj venis tri Esperantaj kantoj: *La Espero* (kun kantistino laŭ malrapida ĵaza stilo), kaj du poemoj, nome *Printempo Venos* kaj *El papilio* (kun kantistino kies patro ankaŭ angligis la poemojn).



Tomaso komponis la plejparton de la kantoj, kvankam ili ankaŭ estas improvizitaj de li kaj la aliaj muzikistoj. Jen la teksto de la du poemoj. ★

– *Thomas ECCARDT*

### Printempo venos



Se la naturo rigidiĝas
De prem' de l'vintro
frostiganta
Se tute per la neĝ'
kovriĝas
Jam longe tero
ekdormanta,
Amiko kara! vi ne ploru:
Printempo venos kaj
somero,
Ke la naturo ree floru,
Ke verdu, reviviĝu tero.

*A. Naumann*



### El papilio

Estas mi — papili'
gajflirtanta en aero,
dancas mi, ĝojas mi
tutan tempon dum
somero.
De la lun', ĝis la sun'
kun korjun'
flugas mi;
de la ter', de mizer',
de sufer'
flugas mi.

Kantas mi, gaja tril'
ĉie flugas kun sincero,
brilas mi per flugil',
ĉiujn vokas al etero.
Firmament', dolĉa
sent',
sorĉa tent'
regas min.
Sunradi'! Harmoni'!
Dancas mi
en senfin'!

*E. Miĥalski*

## Polico kaj Esperanto – Anekdoto de Alex Karkovsky

En 1993 la ELNA jarkongreso okazis en kampuso de Hartforda Universitato. Ĝin partoprenis ankaŭ konata kebeka Esperanto-aktivulo Normando Fleury. Al mi ŝajnis, ke la kampusa polico suspekte rigardis konferencanojn, kiuj parolis ne gepatran lingvon, sed tiun, strangan – al lokanoj – Esperanton. Unufoje, sur ŝoseo, kiam Normando ŝoforis sian aŭton, nin akompanos alia aŭtomobilo – policana.

Oni indikis, ke ni haltu. Normando, eksterlandano, ne hastis obei: renkontiĝo kun polico en fremda lando promesis al li nenion bonan. Tamen finfine nia aŭto haltis. Policano alproksimiĝis kaj observante algluaĵojn sur nia aŭto *Lernu Esperanton* kaj *Esperanto estas lingvo de paco*, demandis: "Kie mi povus studi vian lingvon?" Normando ekridetis kaj donis al li sian adres-karton. ★

## Kalendaro

**Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.**

**Aprilo 2003** — **25**

**ESNY KUNVENO**
Diskuto pri la iraka milito,
*kaj* Surpriza Prelego
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Majo** — **4**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 124)

**16**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## IBM Plaza

La 6-an de aprilo pli malpli 10 geesperantistoj neformale kunvenis ĉe IBM Plaza. Ni priparolis multajn aferojn precipe la militon en Irako. ★



– *Thomas ECCARDT*

## Programo

Niĵl Blonstein gvidos diskuton pri ĉu la milito en Irako estis justa, kun mallonga enkonduko de favoraj kaj kontaŭaj ideoj. Ĉiu ĉeestanto ankaŭ kunportu laŭeble ideojn kontraŭ kaj favore.



En ĉiu parol-vico ĉiu ĉeestanto rajtos paroli 4 minutojn. Se restas tempo ni okazigos plurajn vicojn. ★

– *T.E./N.B.*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 123 – Aprilo 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com


© 2003 Esperanto Society of New York